

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №8-9



La Kongresa Sezono en Esperantujo:

- ◆ **Universala Kongreso en Lahtio**
 - ◆ **Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Liptovský Hrádok**
 - ◆ **SAT-Kongreso en Barcelono**
 - ◆ **Instruista kongreso en Čačak**
 - ◆ **Baltiaj Esperanto-Tagoj en Panevežjo**
 - ◆ **Internacia Esperanto-Konferenco en Kondoros**
 - ◆ **Nord-Amerika Somera Kursaro en Raleigh**
- kaj multaj aliaj kongres-sezonaj eventoj**

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2019. №8-9 (298-299)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 73-74.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2019, №8-9 (298-299).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 2 сентября 2019 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Russ Williams. La kvara UK en Finnlando	6
Rezolucio de la 104a Universala Kongreso de Esperanto	12
Paweł Fischer-Kotowski. La komitato de UEA en Lahtio	13
Eventoj	16
Halina Gorecka. BET-55, rekorda kvante kaj kvalite	17
Povilas Jegorovas. 450 aliĝintoj al BET-55	19
Amri Wandel. Unuafoje universitata AIS-sesio dum BET.....	20
Emília Štecová. La unua IJK en Slovakio	22
Nova estraro de TEJO.....	23
Peter Baláž. Nitro denove gastigis esperantistojn.....	24
Kryštof Klestil. SEP, la unua Esperanta kodum-maratono	25
Mireille Grosjean. La 70-jara ILEI kongresis en Serbio	28
Horst Vogt. Neforgesebla IEK pri hungara kulturo	29
Gary Mickle. SAT-kongreso 2019: la “fajra rozo” eksterkutime logis.....	31
Enrique Haro Márquez. La ora jubileo de NASK.....	33
Fritz Wollenberg. Zamenhofparko en Berlino jam dekjara.....	35
Lars Sözüer. Esperante sur du radoj	37
Ariel Palmer. Fieru!	39
Ihor Glagolevsjkyj. La Odesa tendaro: malgraŭ ĉio.....	39
Pavel Veselov. Esperanto sonas en Kamĉatko	40
Arkonaŭtoj kunvenos en Poznano por la 35a fojo!.....	40
Premio Deguĉi 2019 al Heidi Goes	41
Koncize (10 informoj)	42
Tribuno	43
Edmund Grimley Evans. Parencoj	44
UEA engaĝiĝas por plurlingveco en scienca komunikado.....	47
Unesko unuafoje uzos Esperanton en festivalo	48
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj	48
Arkivo	49
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aŭgusto-septembro.....	50
Vytautas Šilas. LEA 100-jara jam!	51

Kulturo	54
Aleksander Korĵenkov. Prezento de la nova eldono de BLK en Paneveĵo.	55
La aŭtoroj de NDK ricevis la lastan premion de OSIEK.	57
Laŭreatoj de la premio de OSIEK.	58
Sergio Pokrovskij. Civilizaciaj diferencoj (Recenzo: Fössmeier R., Maitzen H. M. <i>La gregoria kalendaro reformo kaj ĝiaj postefikoj</i>)	59
Paŭlo Moĵajevo. Plaĉa disko, sed sen la kaptivo (Recenzo: Vojaĝo. <i>Planedo nia</i>)	66
Flo! La oka albumo de <i>Kajto</i>	67
<i>Rok-gazet'</i> disponeblas en la reto	68
Ricevitaj gazetoj	68
Mozaiko	69
Natalija Ĥodunova. Konatiĝu: uzbeka pilafo.	70
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.	72
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	73
Reklamo	75

Kiel kutime, la postkongresa *Ondo* estas dediĉita al la Kongresa Sezono, dum kiu en Esperantujo okazis multaj kongresoj, festivaloj kaj aliaj renkontiĝoj, interalie, la unua Internacia Junulara Kongreso en Slovakio, foto el kiu (de Ariel Palmer) ornamas la kovropaĝon.

Tamen la sekcio *Eventoj* okupas ne la tutan postkongresan numeron, kaj vi povas legi ankaŭ pri la cenjariĝo de Litova Esperanto-Asocio, kristanaj kalendaroj, homaj parencorilatoj, Samarkanda pilafo kaj aliaj temoj.

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



La Lahtia kongreso kun nur 917 aliĝintoj estis la plej malamasa UK en Eŭropo post la Dua Mondmilito, sed kiel la kongresejo servis la vintra stadiono “Isku Arena”, kies tribunoj povas gastigi 5330 spektantojn. (Foto: Anna Striganova)

La kvara UK en Finnlando



104a Universala Kongreso de Esperanto

Lahtio, la 20-27an de julio 2019

Jen personaj impresoj kaj spertoj dum la 104a UK. La kongresa urbo Lahtio estas multe pli malgranda ol aliaj lastatempaj kongresaj urboj (Lisbono 2018, Seulo 2017), do la etoso estis pli trankvila kaj natura. Finnlando estas ĝenerale tre arbo-plena lando, kaj Lahtio estas aparte verda pura urbo kun belaj parkoj kaj lagoj kaj bela milda vetero; ĝi eĉ estos Eŭropa Verda Ĉefurbo en 2021. Do la kongresa temo “Vivanta naturo, floranta kulturo” taŭgis por Lahtio, kaj la temo diverse eĥiĝis ofte dum la semajno en multaj paroloj, rilate naturon kaj ekologion, kaj rilate indiĝenajn kaj minoritatajn lingvojn, kaj ankaŭ pri la grava interdependa rilato inter naturo kaj homa socio.

La kongresejo estis nekutima kaj iom stranga: sporta areno de urba hoketeamo (la *Pelikanoj*). Tial multaj el la programĉambroj havis strangan formon aŭ tro multan spacon, kaj oni devis trairi longajn koridorojn ĉirkaŭ la hokeejo por atingi programĉambrojn, do pluraj programeroj situis ankaŭ en proksima junulara konstruaĵo, kiu havis kelkajn pli kutimajn taŭgajn ĉambrojn por prelegoj. (Sed multaj bone lokitaj signoj helpe indikis la vojojn kaj eĉ distancojn al ĉambroj!) Estis malavantaĝe, ke ne eblis loĝi tuj proksime al la kongresejo, kaj la ĉefaj hoteloj situis ĉirkaŭ dek minutojn for. Mi kaj mia edzino Anna loĝis multe pli fore, sed bonŝance ni akiris biciklojn, kio ne nur ŝparis al ni tempon dum la semajno, sed ankaŭ donis multan plezuron dum ni biciklis tra la preskaŭ senaŭta urbeto. Vespera biciklado tra Lahtio vere agrablis, kaj kelkfoje ni rimarkis leporojn en parko, dum ni revenis hejmen.

Pri la kongresejo estis plaĉe kaj laŭdinde, ke multaj laborantoj (pordogardistoj, manĝovendistoj k. a.) anticipe lernetis iom da Esperanto kaj tra la semajno afable diris “Saluton!”, “Ĝis!”, “Dankon!” ktp al kongresanoj. (Por pli ampleksaj konversacioj, oni tamen ŝanĝis al la angla aŭ eventuale la finna, nesurprize!)

Pri la junulara konstruaĵo, laŭdindas organizitaj vesperaj programoj tie, inkluzive unu kun diversaj finnaj manĝaĵoj kaj drinkaĵoj, kaj unu kun tabulludoj. Junuloj ankaŭ bone organizis multajn aliajn programerojn (naĝadon, saŭnon ktp.)

Kvankam oficiale la kongreso komenciĝis sabate, jam vendrede multaj homoj alvenis; bonaŭgure okazis bona vigla gaja koncerto de la triopo *Asorti* en la proksima drinkejo *Hygge* (kiu montris Esperantan flagon ekstere). Tio estis tre agrabla kvazaŭ interkona vespero.

La sabata Movada Foiro estas bona kaj relative nova tradicio dum UK. Ĝi estis ne tiel ĝene densa kiel en Lisbono, bonŝance! Tamen la Foiro estis dividita en du partojn: en la enira halo estis ja iom tro dense, kaj krome oni facile ne konstatus, ke tio estas nur duono de la foiro, kaj necesas iri supren laŭ ŝtuparo al longa koridoro por trovi la duan duonon en longa vico.

Dum UK mi pli interesiĝas pri kulturaj programeroj ol pri movadaj politikaj aferoj, do mi ne spektis komitatajn kunvenojn kaj ne povas multe raporti pri tio; interesatoj pri tio eventuale legu aliloke en *La Ondo*. Oni rimarkis, ke nun la estraro de UEA estas tute vira, dum la estraro de TEJO havas multajn virinojn. Mi aŭdis parton de la programero “CO respondas”, kiu ŝajnis fojfoje streĉa, kaj finiĝis iom surreale kun pridemandado kiel la necesejoj estas purigataj nun en la centra oficejo post maldungo de purigistino. Kaj tio estas la fino de mia Latino, se temas pri movada politiko dum UK.

La kongresa inaŭguro procedis kutime, kun iom tro da solena blablaado laŭ la gustoj de multaj, sed, nu, jen tradicio. D-ro Margareta Zaleski-Zamenhof transprenis la tradicion de sia patro saluti kiel reprezentanto de la familio Zamenhof. Kiel ĉiam estis longa (ne ĉiam laŭalfabeta) vico da landaj salutoj; miasente, oni ĉi-foje ĝenerale sukcesis malkuraĝigi tro longajn landajn salutojn, kaj mi ĝuas la tradicion, eĉ se ĝi fojfoje iĝas ripeteca; tamen mi aŭdis plendojn pri tiu tradicio de iuj kongresanoj. Simile, mi ĉiam aŭdas plendojn pri la trolonga solena fermo (ekzemple longa listo de longdaŭraj membroj de UEA – oni almenaŭ diru pli koncize “40 jaroj, sinjoro A, sinjorino B, sinjoro C” anstataŭ malkoncize solene “40 jaroj, sinjoro A; 40 jaroj, sinjorino B; 40 jaroj, sinjoro C...”)). Evidente longaj solenaj paroloj, salutoj de vico de reprezentantoj de ĉiu lando, ktp plaĉas al iuj kaj ne al aliaj, kaj ne eblas plaĉi al ĉiuj. Mi aŭdis, ke UEA celas enketi kongresintojn pli profunde ĉi-jare por provi pliagordigi venontajn kongresojn al la gustoj de la plejmulto. Ĉiuokaze unu ferma solenaĵo klare plaĉis al multaj homoj, kiam ni spektis filmitan saluton de Amanda Lind, sveda ministro pri kulturo, kiu ĉarme parolis mallonge en bona Esperanto.

Ĝi estas demonstra versio de la 75-paĝa postkongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La komitato de UEA en Lahtio

Delonge la komitata kunveno de UEA ne havis tian gravecon kiel tiu, kiu okazis en la 104a Universala Kongreso en Lahtio. Kiam la komitato de UEA kunsidis en 1922 en la proksima Helsinko, ĝi enkondukis la t. n. Helsinko-sistemon pri kunlaboro de UEA kun la naciaj societoj. Tiu aranĝo validis dum la postaj dek unu jaroj, ĝis estis farita la nova interkonsento en Kolonjo. Ĉi-foje la finna kongreso traktis temojn ne malpli gravajn, sed la supera organo de UEA ne faris definitivan decidon pri la plej grava propono.

(Mal)evoluojoj



Mark Fettes

Nur kvin tagojn antaŭ la unua kunsido la forironta prezidanto prezentis la raporton “Evoluojoj por UEA surbaze de financaj faktoj kaj analizoj”, kiun li ellaboris kunlabore kun la komitata laborgrupo pri financa resanigo. Mark Fettes pli-malpli rekte sugestis fermi la Centran Officejon en Roterdamo, bazi la laboron sur volontulaj fortoj, fordonaci la Bibliotekon Hector Hodler kaj transdoni la libroservon al alia organizaĵo, ekzemple, Flandra Esperanto-Ligo. Laŭ la raporto la domo en Roterdamo povus esti parte ludonita al iu neesperantista organizaĵo aŭ firmao – kaj i. a. pro tio necesus seniĝi de la libroservo, kiu okupas ĉambron kun montrufenestroj, apud la enirejo de la domo.

La komitataj ne lasis sin konduki je la nazo kaj ekpostulis detalojn. La diagramoj kaj tabeloj en la Fettes-raporto ne estis por ili sufiĉaj. Necesas konsideri plurajn faktorojn, pri kiuj la aŭtoro ne sciis aŭ ne povis mem profunde analizi ilin. Laŭ la propono de Guy Matte la komitato postulis pli detalan raporton pri “financaj kaj administraj evoluojoj”, kiu inkluzivu analizon pri kostoj de diversaj alternativoj. La raporton devos pretigi la estraro kunlabore kun la komisiono pri financo kaj prezenti ĝin al la komitato ene de ses monatoj. Tiel la definitiva decido pri la estonteco de la asocio ne estis farita kaj la tasko falis sur la ŝultrojn de la novaj estraranoj, elektitaj en Lahtio.

La nova estraro

Por la unua fojo de post 1986 okazis, ke la komitato povis elekti prezidanton el du kandidatoj, sed eble unuafoje en la historio tiu elekto estis tiel malfacila. Duncan Charters (Usono) kaj Fernando Maia Jr. (Brazilo) ricevis egalan nombron de voĉoj. Post ioma diskuto, en kiu aperis eĉ proponoj havi du prezidantojn samtempe aŭ dividi la trijaran oficperiodon inter ili, la komitato revoĉdonis kaj per plimulto de nur

unu voĉo elektis Duncan Charters kiel novan prezidanton. Fernando Maia Jr. elektiĝis kiel vicprezidanto kaj laŭ tujaj deklaroj, li intencas rekandidatiĝi por la prezidanteco post la deĵoro de Charters. Dume ambaŭ elmontris grandan kunlaboremcon kaj konverĝecon de siaj celoj kaj vidpunktoj pri UEA.

Aldone al ili la estraron eniris ses pliaj personoj. Kiel dua vicprezidanto oficos Huang Yinbao – Trezoro (Ĉinio). Aleks Kadar (Francio) daŭrigos kiel ĝenerala sekretario, cetere li estos la sola estrarano en Eŭropo. La teamon kompletigas estraranoj: Orlando Raola (Usono), Jérémie Sabiyumva (Burundo), So Jinsu (Koreio) kaj Amri Wandel (Israelo), ĉiuj viroj.

La sola neelektita kandidato estas virino, Chen Ji el Ĉinio. La nova estraro oficos ĝis la Universala Kongreso en 2022.



Duncan Charters

Aliaj elektoj kaj voĉdonoj

Antaŭ la estraraj elektoj por la komitataneco C estis elektitaj ĉiuj naŭ kandidatoj kaj tiel la komitato en unu fojo – jam komence de la oficperiodo – preskaŭ elĉerpis la limon de dek komitatanoj C. Notinde, inter la kandidatoj estis Mark Fettes, kiu ricevis plej multajn kontraŭajn voĉojn: 6 el 35. Tiu rezulto ne povus tamen esti interpretita kiel malaprobo de lia sesjara prezidanteco, kiun – ni memorigu – li komencis per elektiĝo unuanima.

Ĉi-foje eĉ rutinaĵo kiel aprobo de la protokolo el la antaŭa jaro kaŭzis vervan diskuton. La komitato decidis forstreki el la pasintjara protokolo etan parton, kiu detale priskribis diskuton, en kiu partoprenis la protokolanto mem kaj ĝi enhavis personan atakon, kio malplaĉis al la komitato. La koncizigo de la tikla fragmento estis aprobita kun 17 voĉoj poraj, 14 kontraŭaj kaj 10 sindetenoj. Tio estu plia indikilo pri iom nekutima dividiteco de la komitatanoj en Lahtio.

La raporto pri plenumo de la komitataj decidoj el la pasintjara UK estis aprobita unuanime, dum la estrara raporto pri 2018 ricevis 3 sindetenojn. Iom pli da malkontento estis pri la buĝeto por 2020, kiu antaŭvidas deficiton de preskaŭ 63 mil eŭroj, kaj tio jam post la tranĉo de preskaŭ duono de la salajroj. La buĝeto estis tamen akceptita sensaĝe kun 2 kontraŭoj kaj 9 sindetenoj.

La tranĉo de la salajroj kaj la situacio en la oficejo estis aparta temo, ĉi-jare traktita pli detale. Parto de la kunsido estis sekretigita kaj kadre de fermita sesio la ĝenerala direktoro prezentis sian raporton pri la situacio en la CO. En la kongreso partoprenis du el la oficistoj kiujn minacas la tranĉo de salajroj kaj laborhoroj. Laŭ la propono de Ans Bakker, farita ankoraŭ antaŭ la kongreso – sed kontraŭ deziro de Mark Fettes – ili estis invititaj por prezenti siajn vidpunktojn. La rezultoj de ĉi tiu kunsido ne estas publikaj.

Ne ricevis aprobon la propono pri modifo de la kotizoj por landaj asocioj laŭ la

spirito de la nova kotiztabelo por individuaj membroj. La komitatanoj prave atendis, ke ĝi estu unue konsultita kun la koncernatoj. Tiu konsultado, same kiel la laboroj pri la nova raporto pri “evoluvoj”, devos okazi ene de ses monatoj post la kongreso.

La komitato elektis neniun novan honoran membron kaj akceptis neniun novan landan aŭ fakan asocion, ĉar neniun propono aperis sur la tablo. Ĝi tamen eksigis Maltan Esperanto-Grupon, ĉar tiu ĉesis plenumi la kondiĉojn de aliĝinteco. Similan intencon la malnova estraro havis pri la landa asocio de Ebur-Bordo, sed tio estis priprotestita de la nova estrarano J r mie Sabiyumva, jam en la komitata kunsido. La kontra argumento ke la situacio estis bone esplorita, konsultita kaj aprobata de la Afrika Komisiono estis rapide refutita de Renato Corsetti: – Mi pli fidus al J r mie ol al la Afrika Komisiono.

La plensesioj de la komitato okupis ĉi-jare tre longan tempon. En kvar kunsidoj oni laboris entute pli ol 13 horojn, al kio aldoniĝas ankoraŭ la komitataj forumoj pri specifaj temoj. Tio estas multe pli ol kutime, sed evidente la situacio postulas eksterordinaran engaĝiĝon de la komitato. La kvorumo ne kaŭzis problemon, sed kelkaj, kiuj intencis partopreni, ne povis tuj aliĝi al la kunsidantoj pro malĝusta plenumo aŭ manko de nomuma formularo, ĉar eĉ la jamaj komitatanoj devis esti renomumitaj pro la nova oficperiodo. Tiu problemo ne devus aperi en la venonta jaro, sed ni esperu ke tiam ne estos pli grandaj zorgoj...

Paweł Fischer-Kotowski



La nova estraro de UEA: So Jinsu, Orlando E. Raola, Fernando Maia, Duncan Charters, Huang Yinbao, J r mie Sabiyumva, Aleks Kadar kaj Amri Wandel.

Eventoj



La okcitana kantisto kaj muzikisto Jean-Marc Leclercq, konata en Esperantujo kiel JoMo (kaj jOmO), verŝajne estas la plej ofta koncertanto en la esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj dum la du lastaj jardekoj. Ankaŭ ĉi-somere li kantis en la Lahtia UK, en la Barcelona SAT-kongreso, kaj en la Nitra SES, kie lin fotis Petro Baláž.



BET-55, rekorda kvante kaj kvalite

La 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiujn la 6-14an de julio gastigis la Litovia urbo Panevežio (Panevėžys), ne nur laŭ la nombro de la partoprenintaj personoj kaj landoj superis ĉiujn BETojn, kiuj okazis post la disfalo de Sovetunio en 1991, ĝi estis rekorda ankaŭ el la programata vidpunkto.

Kiel provleganto de *La Ondo de Esperanto*, en kiu dum unu jaro regule aperis bunta materialo prepare al BET-55, mi estis konsternita pro la abundego da planataj programeroj. Ĉu oni vere havos sufiĉajn vizitantojn por sciencaj prelegoj kaj prelegserioj? Aŭskultantojn por multegaj – ne nur vesperaj – koncertoj kaj artaj prezentoj? Ja BET ne estas universala aŭ kontinenta kongreso... Mia antaŭtimo estis vana. La enorma kvanto da partoprenantoj (pli ol 400 el la 450 aliĝintoj venis al Panevežio) kaj la pluveta vetero ebligis al ĉiu prezentanto havi sian publikon. Mia samlandano eĉ plendis, ke preskaŭ ĉiam estis malfacile elekti, al kiu el la interesovekaj eroj iri, ja samtempe okazadis po kvar programeroj paralele al la plurnivelaj kursoj de Esperanto. Senpaga instruado de Esperanto je diversaj niveloj kun diverslandaj instruantoj estas senduba atuto de BET.

Mi ne listigos ĉi tie temojn kaj nomojn de la prelegantoj – vidu la programon en nia retejo <http://sezonoj.ru/bet55>. Sed mi menciuj la absolutan novaĵon de BET-55 – la sukcesan okazigon de la studadsesio de AIS (tamen mi ŝatus atentigi, ke por prelegoj kadre de AIS-sesio oni havu pli striktajn kriteriojn de “scienceco” por ne kompromiti SUSon). Mi mem ne senplezure ĉeestis kelkajn el la prelegoj de Walter Ŝelazny kadre de du liaj prelegocikloj pri religio kaj sociologio de la Esperanto-movado. Tiuj ofte similis al diskutrondo ne al klasikaj prelegoj. Nu, Walter la Fera scias provoki... Ankaŭ la kultura kaj arta programoj estis tre variaj kaj riĉaj, sed ne atendu de mi la listigon de la artistoj – por tio necesus aparta artikolo – sed, denove, vidu la programon kaj bedaŭru vian nepartoprenon.

Kiel kutime je la dispono de l' partoprenantoj estis klaso kun multaj komputiloj; en la antaŭsalona halo kun molaj sofoj kaj foteloj oni povis interparoli aŭ spekti sur granda televida ekrano konstante projekciatajn freŝajn fotojn; ĉiutage aperis la

BETa gazeto *Abelo*, redaktita de Stano Marček, kun pli da fotoj ol da teksto, liveranta ankaŭ ĝisdatan programon por la venonta tago.

La solena inaŭguro okazis en la komunuma kulturcentro, ĝin sekvis urba koncerto kaj regalo por centoj da partoprenantoj kaj dekoj da artistoj – vera tumulto kaj rumoro, en kiu oni gaje renkontis amikojn, tostis (vino abundis) kaj manĝetis. Neniam mi spertis en Esperanto tiel amasan regaladon, post kiu pluraj aktivuloj eliris *tro* gajaj por daŭrigi la festadon en dekoj da privataj grupoj.

Multnombra aliĝintantaro en negranda urbo kreis por la organizantoj multajn defiojn, kiujn ili sukcesis solvi. La BETanoj loĝis en pluraj hoteloj kaj studentejoj de Paneveĵo, dum la laborprogramo okazis en la universitata konstruaĵo urborande. Trifoja manĝado estis organizita dualterne en la kafejo de la urba scienca kaj teknologia parko je promendistanco de la BETejo, kvankam la menuo estis iom monotona, kaj iujn ĝenis neceso veturi por frua matenmanĝo.

Eble la disa loĝado kaj flanka situo de la fakultata konstruaĵo (kaj diligenta partopreno en la programo) ne tre videbligis esperantistojn en la urbo. Tamen la verdan popolon oni povis renkonti en la ĉefaj turismaj lokoj: sur la promenvojo ĉe la artefarita lago en la malnova riverfluejo, sur la placo Laisvès, en multaj trinkejoj kaj kafejetoj. La utila *Gvidlibro* pri Paneveĵo en Esperanto, eldonita de la urba Turisma Oficejo, enhavis priskribon de la vidindaĵoj kaj ekskursajn itinerojn. Tio helpis nin memstare konatiĝi kun la urbo, kvankam la faman ĉaran pupteatron ni sukcesis malkovri nur je la dua promenado.

La loĝantaro de Paneveĵo malkreskis ekde la 1990aj jaroj de ĉ. 126 mil al malpli ol 90 mil. Tio sentiĝas – en la stratoj tute mankas aŭtoŝtopiĝoj, tial sen tro da tempo-perdo oni venis al BET-ejo per urba buso aŭ taksio.

Alia utila presaĵo, ricevita de ĉiu BETano, estis la enorma “Kongresa Libro” kun 156 paĝoj – pli ampleksa ol la kongresaj libroj de la lastatempaj UKoj. Krom la informoj pri la aktuala BET, ties programo, prezento de la kontribuantoj, salutmesaĝoj de la Litoviaj kaj Esperantaj gravuloj, ĝi enhavas historie valorajn tabelojn kaj tekstojn, interalie, pri ĉiuj Litoviaj BEToj, eseojn pri la centjara Litova Esperanto-Asocio kaj pri la pionira esperantisto Aleksandras Dambrauskas.

Same kiel en UK, ankaŭ en BET merkredo estas ekskursita tago, sed ekskursi oni povis ankaŭ en aliaj tagoj. Ĉi-foje estis ebleco organizite viziti bienpalacon en Pakruojios, kie okazis florfestivalo, gustumi bieron en la kastelo de Biržai kaj spekti tie folkloran programon. Duontaga ekskurso inkluzivis gustumadon de herbaj teoj.

Je ĉiu tria jaro, post nia ekloĝo en Kaliningrado, nia *Onda* duopo (Aleksander kaj Halina) partoprenas en BEToj, kiam estas la vico de Litovio okazigi ĝin. Tio okazas ne nur pro la najbareco, sed pro la jardekojn longa kunlaborado kun la motoro de la Litovia Esperanto-movado Povilas Jegorovas. Se temas pri BET, la kunlaboro niaflanke estas ĉefe informado reta kaj gazeta dum la antaŭa jaro. Nia surloka kontribuo estas kutime nur du-tri programeroj; ĉi-jare ni prezentis la novan eldonon de *Baza Literatura Krestomatio* kun deklamado de elektitaj eroj (parenteze mi notas

kun kontento la bonegan vendostatistikon de BLK en Paneveĵo). Tre vigle pasis nia kvizo “Kiu estas sur ekrano?” pri la eminentuloj el la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegare*, kvankam ĉagrenis ĝiajn aŭtorojn la fakto, ke kelkaj gravaj Esperanto-agantoj ne estis rekonitaj laŭvizaĝe. Venkis en la kvizo la pola sciulino Teresa Pomorska, kiu ricevis premie ekzempleron de la enciklopedio.

Halina Gorecka

450 aliĝintoj al BET-55

Al BET-55 aliĝis 450 personoj el 37 landoj – rekorda partoprenantaro en BET post la disfalo de Sovetunio en la 1991a jaro. La antaŭa rekordo estis 334 personoj en BET-52, la antaŭa Litovia BET, okazinta antaŭ tri jaroj en Birŝtonas.

La plej multaj aliĝintoj estis el la kongreslando Litovio – 142 personoj (31,5% de la BETanaro); sekvas Pollando 69, Koreio 39, Latvio kaj Ruslando 26, Francio 22, Germanio 16, Belgio 11, Hungario kaj Ukrainio 9, Estonio 8, Finnlando kaj Svedio 6, Ĉeĥio, Hispanio, Luksemburgio, Nepalo 5, Belorusio kaj Ĉinio 4, Israelo, Pakistano, Usono, Uzbekistano 3, Aŭstrio, Bulgario, Danlando, Japanio, Kanado, Norvegio, Svislando 2, Italio, Kazaĥstano, Kubo, Nederlando, Niĝerio, Slovakio, Togolando 1.

Povilas Jegorovas

La tria plej granda landa grupo venis al Paneveĵo el Koreio – 39 personoj. La koreaj esperantistoj aktive kontribuis al la arta kaj prelega programoj de la 55a BET. (Foto: Anna Striganova)



Unuafoje universitata AIS-sesio dum BET



Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS, <http://www.ais-sanmarino.org>) estis fondita en 1985 de profesoro Helmar Frank, kun la vizio fariĝi internacia universitato sen muroj, konsistanta el renomaj universitatoj kaj docentoj diversnaciaj. Ĝia jura bazo estas en San-Marino, kaj sekve ĝia plej elstara studad-sesio nomiĝas Sanmarinea Universitata Sesio (SUS).

Dum SUSoj kaj aliaj AIS-sesioj okazas universitatnivelaĵoj studoj en pluraj lingvoj (la oficialaj lingvoj de AIS estas Esperanto, la germana, la angla kaj la Itala). AIS regule okazigas tri studsesiojn jare en Esperanto: SUS, IKU-AIS kunlabore kun UEA dum la UK, kaj IVU, la Internacia Vintra Universitato dum la jarŝanĝaj kunvenoj en Germanio (IF, NR, Luminesk).

En la lastaj jaroj AIS komencis okazigi siajn SUSojn kadre de esperantistaj renkontiĝoj. En 2017 la 34a SUS okazis en Varsovio, ĉe la Varsovia Altlernejo pri direktado, en 2018 SUS-35 en San-Marino kadre de la Itala Kongreso, kaj ĉi-jare SUS-36 okazis en Panevėžys (Litovio), kadre de la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, unu semajnon antaŭ la 104a Universala Kongreso en Lahtio.

La programo de SUS-36 estis eksterordinare abunda kaj diverstema. Dum la solena BET-inaŭguro, okazinta dimanĉe en la kultura centro de Panevėžys, salutis la prezidanto de AIS prof. Amri Wandel, kiu sekve prezentis dum SUS kurson pri spac-teleskopoj, interalie, pri la fama spac-teleskopo Hubble kaj pri ĝia multe pli kapabla sekvanto lanĉota en 2021, spac-teleskopo James Webb.

Daŭrigis la natursciencan parton de SUS en Panevejo prelegserio pri "Media kemio" prezentita de Orlando Raola. Oni aŭdis pri medioprotektado en la hidrosfero, tero kaj biosfero. Du sendependajn prelegojn pri gravitaj ondoj kaj pri la fama nombro "Pi" faris Alfred Heiligenbrunner.



Ĝi estas demonstra versio de la 75-paĝa postkongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



En kelkaj sekvaj paĝoj Edmund Grimley Evans provas solvi jenan taskon: kiel rezonus eksterteranoj, se ili volus logike priskribi la parenkorilatojn inter homoj? (Foto: Yiting Liu)

Parencoj

Imagu, ke eksterteranoj volus priskribi la parenkorilatojn inter homoj. Eble ili obser-
vus kaj rezonus jene:

* Preskaŭ senescepte, ĉiu homo estiĝas per kombinado de genetika materialo
el du jam ekzistantaj homoj. Kiel ni nomu la rilaton inter la nova kaj tiuj ekzistantaj
homoj? Se C estiĝas tiel el A kaj B, ni diru, ke C estas *ido* de A kaj B. Jen bela kon-
ciza vorto! Ni elektu tian vorton ankaŭ por la alia direkto: ni diru, ke A kaj B estas la
aboj de C (*gepatroj* en Esperanto).

* La rilato abo-ido implicas aliajn rilatojn. Ekzemple, abo de abo de iu estas ties
... *ababo* (*avo* aŭ *avino* en Esperanto). Kaj ido de ido de abo de abo de iu estas ties
ababidido (*duonkuzo* aŭ *duonkuzino* en Esperanto, se ne estas pli proksima rilato).
Eblas ankaŭ *ididababo*: jen la rilato inter du homoj, kiuj havas komunan nepon; ĝi
nature estas malpli grava por la koncernaj homoj ol la rilato inter *ababididoj*, ĉar la
rilato estiĝas, kiam ili ne plu estas junaj.

* Se A kaj B havas unu komunan abon, tiam A estas ido de abo de B, do *abido*
de B (*duonfrato* en Esperanto). Tamen ofte, eble pli ofte, okazas, ke A kaj B havas
precize la samajn abojn: du komunajn abojn. Kiel oni esprimu tiun rilaton? A estas
... ĉu *duobla abido* de B? Oni bezonas pli koncizan esprimon por tiel grava rilato!
Ni diru, ke A estas *aĥo* de B (*frato* aŭ *fratino* en Esperanto).

* Kombinite kun la rilato abo-ido, la rilato aĥo-aĥo implicas multajn aliajn rila-
tojn. Ekzemple, iu povas esti aĥo de abo de iu, do ties *abaĥo* (*onklo* aŭ *onklino* en
Esperanto).

* La aboj de juna homo ofte loĝas kune kun tiu homo kaj kelkfoje partoprenis iam
en stranga ceremonio kun transdono de ringo kaj kun ĉeesto de aboj, aĥoj, ababoj,
abaĥoj kaj tiel plu. Sed ofte homoj ekrilatas tiel sen produkti idojn. Evidente temas
pri io grava, eĉ sen la idoj, do ni faru nomon por ĝi. Se A kaj B ekrilatis tiel, ni diru,
ke A estas *eĥo* de B (*edzo* aŭ *edzino* en Esperanto).

* Kombinite kun la rilatoj abo-ido kaj aĥo-aĥo, la rilato eĥo-eĥo implicas pliajn
rilatojn. Ekzemple, iu povas esti eĥo de aĥo de iu, do *aĥeĥo* (*bofrato* aŭ *bofratino*
en Esperanto). Aŭ aĥo de eĥo, do *eĥaĥo* (same *bofrato* aŭ *bofratino* en Esperanto).
Aŭ eĥo de aĥo de eĥo, do *eĥaĥeĥo* (denove *bofrato* aŭ *bofratino* en Esperanto). Aŭ
aĥo de eĥo de aĥo, do *aĥeĥaĥo*. Aŭ *aĥeĥaĥeĥo* aŭ *eĥaĥeĥaĥo*. (Ĉu ankaŭ tiuj estas
bogefratoj en Esperanto? Verŝajne ne.)

**Ĝi estas demonstra versio de la 75-paĝa postkongresa *Ondo*. Por legi
la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.**

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



La 20an de aŭgusto 2019 grupo da esperantistoj venis al la domo de Medem en Kaŭno, kie LEA fondiĝis antaŭ 100 jaroj. La domo, kiu iam havis la adreson Smėlių №12, nun estas anguldomo Grunvaldo №18 / Gedimino №2. La Medema familio posedis sep ĉambrojn en la dua etaĝo (okcidente: la unua etaĝo) kaj tri ĉambrojn en la subtegmenta etaĝo; unu el ili estis destinita por ĉiusemajnaj Esperanto-kunvenoj. (Teksto: Vytautas Šilas / Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

Jubileoj kaj memordatoj en aŭgusto-septembro

1.08. Antaŭ 100 jaroj (1919) en Sofio aperis la unua numero de *Bulgara E-isto*.

1.08. Antaŭ 50 jaroj mortis **Hugo Steiner** (1878-1911-1969), aŭstra fervojoficisto k e-isto; iniciatinto k la unua direktoro de Internacia E-Muzeo ekde ties fondo (1929), prezidanto de Aŭstria E-Delegitaro (AED, 1925-30), prezidanto de Aŭstria E-Asocio (1933-38), fondinto k redaktoro de *Aŭstria E-isto* (1924-38), estrarano de UEA/IEL (1934-38), prezidanto de LKK de la 28a UK (Vieno, 1936), aŭtoro de pluraj libroj k artikoloj. – Legu pli en NDK, p. 265-266.

17.08. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Edmond Privat** (1889-1903-1962), svisa ĵurnalisto, tradukisto, instruisto k e-isto; pledinto por Eo ĉe Ligo de Nacioj, la unua prezidanto de ICK (1923-28), prezidanto de UEA (1924-28), redaktoro de la revuo *Esperanto* (1920-34), E-parolisto en la Svisa Radio Internacia (1946-62), ano de AdE (1920-28, 1948-62), aŭtoro de pluraj beletraj, historiaj, didaktikaj k sociaj libroj. – Legu pli en NDK, p. 234-237.

18.08. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Hideo Yagi** (1899-1917-1964), japana ginekologo k e-isto; ĉefdelegito (1953-62), komitatano (1956-64), estrarano (1959-64) k la unua azia prezidanto (1962-64) de UEA, prezidanto de LKK de la 50a UK (Tokio, 1965), kies okazigon li ne ĝisvivis. – Legu pli en NDK, p. 301-302.

20.08. Antaŭ 100 jaroj (1919) fondiĝis **Litova Esperanto-Asocio**.

20.08. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **István Szerdahelyi** (1924-1949-1987), hungara filologo k e-isto, prezidanto de la ŝtata ekzamenkomisiono pri Eo (1966); fondinto (1966) k gvidanto (1966-87) de E-fako en la filologia fakultato de la universitato ELTE (Budapeŝto), prezidanto de ILEI (1985-87), redaktoro de *Internacia Pedagogia Revuo* (1985-86), ano de AdE (1986-87), aŭtoro de pluraj E-lernolibroj. – Legu pli en NDK, p. 273-275.

24.08. Antaŭ 65 jaroj mortis **Anakreon Stamatiadis** (1868-1904-1964), kuracisto k la plej eminenta greka e-isto; populariganto de Eo en la insulo Samoso kie Eo estis deviga studobjekto en ĉiuj lernejoj, redaktoro de *Greklingva Esperantano* (1909-12), *Bizantio* (1921-24) k *Lingvo Internacia* (1929-36), prezidanto de Helena E-Asocio (1926-51), ano de AdE (1929-64), aŭtoro de pluraj lernolibroj, vortaroj k aliaj libroj en/pri Eo. – Legu pli en NDK, p. 262-263.

20.09. Antaŭ 25 jaroj mortis **Reto Mario Rossetti** (1909-1928-1994), svisdevena brita instruisto k e-isto; iniciatinto de la Belartaj Konkursoj de UEA (1949), ano de la Skota Skolo en la E-poezio, aŭtoro k tradukinto de pluraj E-libroj, kunredaktoro de *Angla Antologio* (Vol. 1, 1957), *33 rakontoj* (1964) k *Trezoro* (1989), ano de AdE (1968-92). – Legu pli en NDK, p. 243-244.

27.09. Antaŭ 45 jaroj mortis **Sándor Szathmári** (1897-1911-1974), hungara inĝeniero, verkisto k e-isto; aŭtoro de originalaj prozaĵoj en Eo, inter kiuj elstaras la utopieca romano *Vojaĝo al Kazohinio* (1958), pri kiu Kálmán Kalocsay skribis: “La libro estas insida. Formetinte ĝin, vi ne liberiĝos de ĝi; vi sentos, ke ĝi lasis en vi hoketojn de problemoj”. – Legu pli en NDK, p. 271-272.

Aleksander Korĵenkov


LEA 100-jaras jam!

La unua litova esperantisto estis la romkatolika pastro Aleksandras Dambrauskas (en Esperantujo konata kiel Aleksandro Dombrovski), kiu esperantistiĝis jam septembre 1887, estante studento de Sankt-Peterburga Teologia Akademio. Sed kiam aperis la litova Esperanto-movado? Ve, nur antaŭ cent jaroj – en la jaro 1919a!

La unuaj Esperanto-organizaĵoj en la teritorio de la nuna Litovio aperis sufiĉe frue: jam junio 1892 fondiĝis Vilna Esperanto-klubo; fine de 1909 en Kaŭno estis registrita Kovna Esperanto-Societo. Sed per Esperanto ili popularigis la rusan, sed ne la litovan kulturon. En ili ja dominis rusparolantoj. Tio estis parto de la ruslanda Esperanto-movado en la litova teritorio. Litovio longe estis aneksita de Ruslanda Imperio, kaj tiam la ĉefa celo de litovoj estis batalo por rajtoj de sia gepatra lingvo, ĉar la Ruslandaj regantoj ĝis 1904 malpermesis la publikan uzadon de la litova lingvo kaj ĝian lernejan instruadon, la polaj ekleziuloj ĉiel ĝenis ĝin en litovaj preĝejoj.

Fine de la Unua Mondmilito disfalis Ruslanda kaj Aŭstra-Hungara imperioj. En iliaj periferiaj partoj formiĝis naciaj ŝtatoj (pola, hungara, slovena, kartvela k. a.). Ne postrestis ankaŭ la litova popolo. La 16an de februaro 1918 Litova Konsilio (Lietuvos taryba) deklaris restarigon de la litovia ŝtato kun la malnova ĉefurbo Vilno.

Por kompreni la cirkonstancojn, en kiuj ekagis litovaj esperantistoj, ni konatiĝu kun tiutempa enlanda situacio. En decembro 1918 Litovion invadis la Ruĝa armeo, kiu okupis la nordorientan teritorion kaj la ĉefurbon Vilno. Nur en aŭgusto 1919 litovoj venkis ĝin. Sed intertempe la ĉefurbon Vilno kaj la apudan sudorientan parton de Litovio okupis armeo de la antaŭnelonge sendependiĝinta Pollando. Kvazaŭ alianco kun poloj, julie 1919 el Latvio en nordan Litovion rabire invadis porgermana armeo de kolonelo Bermond (formita el rusaj blankgvardianoj kaj armeanoj de kaptulacinta Germanio). Decembre 1919 la bermondanoj estis venkitaj kaj forpuŝitaj el Litovio. Pluan penetradon de poloj (kiuj celis aneksi la tutan Litovion) Litovio haltigis nur fine de novembro 1920. La historia litova ĉefurbo Vilno restis sub la Pollanda jugo ĝis oktobro 1939. Pro tio la provizora ĉefurbo de Litovio iĝis Kaŭno. Februare 1919 en Litovio estis enkondukita reĝimo de milita stato, kiu reguligis ankaŭ la ordon de kunveno, fondon de organizaĵoj, funkciadon de gazetaro k.t.p.




Aleksandro Dombrovski

Ĝi estas demonstra versio de la 75-paĝa postkongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La nova, kvara eldono de la legenda kaj leg-enda *Baza Literatura Krestomatio*, premiere prezentita en la 55a BET, jam estas mendebla ĉe la libroservo de UEA kaj ĉe pluraj aliaj Esperantaj libroservoj.



Dum la prezentado de BLK en Paneveĵo (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

Prezentado de la nova eldono de BLK en Paneveĵo

La 8an de julio kadre de la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Paneveĵo okazis primera prezentado de la nova, kvara eldono de la legenda kolekto *Baza Literatura Krestomatío* (BLK), kuneldonita de *Sezonoj* (Kaliningrado, Ruslando) kaj Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj presita en Kaŭno kelkajn tagojn antaŭ BET-55.

La prezidanto de LEA Povilas Jegorovas en sia enkonduka parolado prezentis la 368-paĝan libron kaj revuis la kunlaboron de LEA kaj *Sezonoj* en la libroeldonado, danke al kiu estas produktitaj jam ok kulture kaj/aŭ historie gravaj Esperanto-libroj.

Poste Halina Gorecka rakontis pri la historio de BLK, kies unua eldono, kompilita kaj redaktita de Vilmos Benczik, aperis en Budapeŝto antaŭ 40 jaroj. La dua (1982) kaj tria (1986) eldonoj entenis 134 prozajn kaj poeziajn tekstojn de 59 aŭtoroj. BLK populariĝis en Esperantujo kiel "literatura minimumo en la esperantista kultura komunumo". Ĉar BLK delonge elĉerpiĝis kaj iom malaktualiĝis, *Sezonoj* kaj LEA kontaktiĝis kun Vilmos Benczik, kiu volonte permesis pretigi novan eldonon, kondiĉe ke ĝi enhavu ĉion el la unuaj eldonoj kaj suplementon kun verkoj de novaj aŭtoroj.

Aleksander Korĵenkov, redaktoro kaj kunkompilinto de la nova eldono de BLK, klarigis la principojn de la elektado de la novaj verkoj por la krestomatío. Fine, la *Postrikolton* konsistigis 63 tekstoj de 23 novaj aŭtoroj, kaj la nova eldono de BLK

enhavas 199 tekstojn (du tekstoj estis aldonitaj al la ĉefparto de BLK) de 82 aŭtoroj. Korĵenkov prognozis, ke samkiel iam Vilmos Benczik, ankaŭ la kompilintoj de la nova BLK ricevos ne nur laŭdojn, sed ankaŭ riproĉojn, ekzemple, pro tro malmultaj virinoj kaj ekstereŭropanoj inter la aŭtoroj, aŭ pro manko de iuj konkretaj aŭtoroj kaj verkoj en BLK.

Fine de la programo Halina deklamis du poemojn el BLK. La komenco de la unua poemo "Hieraŭ pluvis, kaj hodiaŭ pluvas / Kaj morgaŭ same, lace glitos gutoj..." (de Nikolao Ĵurzĕns) kaŭzis viglegan reagon de la publiko, kunveninta en komforta universitata salono, kies fenestrojn ĝuste tiumomente atakis tipe litova pluvego.

Pluraj BETanoj tuj profitis la eblon aĉeti la novan eldonon de la krestomatio kontraŭ unuataga promocio prezo, kaj la eldoneja stoko malkreskis je 43 ekzempleroj – tre bona rezulto, laŭ la eldonintoj.

BLK estis aĉetebla en la libroservo de la Lahtia UK, kaj post la kongreso oni povas mendi ĝin en la libroservo de UEA kaj en aliaj libroservoj.


La sekva prezentado de la nova BLK okazos en la 35a festivalo ARKONES, kiu okazos la 20-22an de septembro en Poznano.

Legu pli pri la libro rete: <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga121.htm>

Elŝutu la demonstran version (50 paĝoj el 368): <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Blk-demo.pdf>

Aleksander Korĵenkov





La laŭreatoj en la redakcia biblioteko (Foto: Aleksej Korĵenkov)

La aŭtoroj de NDK ricevis la lastan premion de OSIEK

Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK) ĉiujare atribuas sian premion al vivanta esperantisto pro kultura kreaĵo precipe nefikcia en Esperanto, publikigita per ia ajn perilo (libro, kasedo, bendo, mikrofilmo, K-disko...). Okaze de traduko, la premio rekompencas la esperantigon, sendepende de la naturo de la originalo. La valoro de la premio estas 700 eŭroj.

Kadre de ĉi-jara Internacia Esperanto-Konferenco, okazinta la 13-19an de julio en Kondoros (Hungario), la ĉeestantaj membroj de OSIEK per sekreta voĉdonado atribuis la premion al Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov (Ruslando) pro ilia komuna enciklopedia verko *Nia Diligenta Kolegare* (NDK), kuneldonita de *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio en februaro 2018.

Ĉi tiu premio estas la lasta, aljuĝita de OSIEK, ĉar la Ĝenerala Asembleo de OSIEK, kunveninta en Kondoros, libervole dissolvis la asocion kaj konforme al sia statuto transdonis la havaĵon de OSIEK al E@I, asocio kun similaj kulturaj celoj.

Gratulon al la laŭreatoj!

Pliaj informoj pri NDK: <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120.htm>

Laŭreatoj de la premio de OSIEK

- 1990. Nomura Rihej pro *Zamenhofa ekzemplaro*
- 1991. Evaldo Pauli pro *Mil jaroj de kristana filozofio*
- 1992. Ebbe Vilborg pro *Etimologia vortaro de Esperanto*
- 1993. Ulrich Lins pro *La danĝera lingvo*
- 1994. Rüdiger Eichholz pro *Esperanta bildvortaro*
- 1995. Donald Broadribb pro traduko de *La Respubliko* de Platono
- 1996. Paul Gubbins pro *Kunvojaĝu*
- 1997. Fernando de Diego pro traduko de *Cent jaroj da soleco* de Gabriel García

Márquez

- 1998. Claude Piron pro *La bona lingvo*
- 1999. Xie Yuming pro traduko de *Ruĝdoma Sonĝo* de Cao Xueqin
- 2000. Trevor Steele pro *Falantaj muroj*
- 2001. Eli Urbanová pro *Hetajro dancas*
- 2002. Krešimir Barković pro traduko de *7000 tagoj en Siberio* de Karlo Štajner
- 2003. Gerrit Berveling pro *Antologio Latina*
- 2004. Ed Borsboom pro *Vivo de Andreo Cseh*
- 2005. Christian Declerck pro *Tarokoj kaj epokoj*
- 2006. André Cherpillod pro *Konciza Etimologia Vortaro*
- 2007. Ĵak le Puil kaj Armela Lequint pro traduko de *Vojaĝo ĝis noktofino* de

Louis-Ferdinand Celine

- 2008. Sergio Pokrovskij pro *Komputika leksikono*
- 2009. Spomenka Štimec pro *Kroata milita noktlibro*
- 2010. Baldur Ragnarsson pro traduko de *Sagao de Njal*
- 2011. Laŭlum pro traduko de *Ĉe akvorando*
- 2012. István Ertl pro traduko de *Sensorteco* de Imre Kertész
- 2013. Mikaelo Bronštejn pro *Dek tagoj de kapitano Postnikov*
- 2014. Peter Baláž pro *Esperanto Elektronike*
- 2015. neatribuita
- 2016. Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer pro *Historio de la esperanta literaturo*
- 2017. Josip Pleadin pro *Ordeno de verda plumo*
- 2018. Frédéric Lauriol pro *Teknika vortaro de Greziljono*
- 2019. Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov pro *Nia Diligenta Kolegaro*



Civilizaciaj diferencoj

Fössmeier, Reinhard; Maitzen, Hans Michael. *La gregoria kalendara reformo kaj ĝiaj postefikoj*. – Dobřichovice: KAVA-PECH, 2019. – 32 p.

La verko recenzata

Esperantistoj ĉiam interesiĝis pri la kalendaraj aferoj. Jam en la «Fundamenta Krestomatio» aperis la artikolo «Fingra kalendaro»; poste pri la kalendaroj verkis, i.a., mi mem¹ kaj A. Cherpillod².

Kaj jen ĉi-jare aldoniĝis la recenzata verko pri la kalendara reformo fare de Gregorio la 13^a:

R. Fössmeier, H.M. Maitzen: *La gregoria kalendara reformo kaj ĝiaj postefikoj*. KAVA-PECH, 2019. ISBN 978-80-87169-96-4. — 32 p.

Kiel anoncas ĝia *Resumo* (p. 7),


Ne ĉiuj landoj tuj sekvis la reformon, iuj faris la ŝanĝon nur en la 20^a jc. La kalendara diferenco kaŭzis aron da interŝtataj problemoj inkluzive de civilizaciaj. Elstara ekzemplo estas la milito en 1805 inter Napoleono la 1^a kaj kaj alianco rusa-aŭstra. La franca armeo venkis pro la uzo de malsamaj kalendaroj en la alianco.

La civilizaciaj diferencoj estas interesa temo, kaj la recenzata broŝuro donas plurajn ekzemplojn pri ili; tamen ne tiujn, kiujn celis la aŭtoroj — la interesajn ili probable ne rimarkis, kaj prezentis ilin senintence.

Ulmo

Jen kiel la aŭtoroj prezentas sian ĉefan kaj la plej efektan ekzemplon (p. 9):

La franca imperiestro ... pretigis en Bulonjo sian Grandan Armeon ... dum la jaro 1805 por realigi la invadon de Britujo ... Sed pro la minacanta atako de diversaj eŭropaj landoj kaj regnoj, kiuj celis haltigi la ekspansiismon de Napoleono, li rezignis pri tiu invado kaj de Bulonjo moviĝis direkte al Aŭstrio, kies imperiestro Francisko la 1^a kontraktis aliancon kun la rusa caro Aleksandro la 1^a por ataki Napoleonon. La kampanjo atingis unuan kulminon per la batalo ĉe **Ulm** en Bavario, kie la aŭstra armeo estis komplete detruita pro tio, ke la rusaj aliancanoj malfruis en la alveno al **Ulm** ĝuste je 12 tagoj, la tiama diferenco inter la gregoria kaj julia kalendaroj!



Mi nemalbone konas la historion de la napoleonaj militoj, sed ĉi tiun version pri la Ulma malvenko mi renkontis unuafoje. Bedaŭrinde la aŭtoroj ne donas bibliografian referencon pri tiu aserto. Mi provis mem serĉi en nerusaj verkoj, kaj trovis preterpasan mencion ĉe aŭtoritata brita historiisto *David Chandler* (*Ĉandler*)³ (p. 329).

Laŭ Chandler (p. 328, 329), la aŭstria *Kortega Militkonsilio* (Hofkriegsrat) prognozis, ke la kampanjo (samkiel antaŭe) okazos en la Norda Italio, kaj tien sendis sian plej grandan armeon kun ĉefduko Karlo. La okcidentan limon de Aŭstrio devis gardi ĉefduko Johano en Tirolo kaj ĉefduko Ferdinando ĉe la rivero **Inno** (Inn) en Bavario. Fakte la armeon de Ferdinando komandis lia stabestro kaj mentoro, generalo **Mako** (Generalquartiermeister *Karl Mack*). La armeo de Ferdinando/Mako devis sekurigi la venon de la rusa armeo de Kutuzov — ne por ia batalo ĉe Ulmo, sed por posta kuna ofensivo en Francion.

La caro promesis, ke Kutuzov venos Bavarion la **20-an de oktobro** (p. 328). La armeo de Ferdinando iris al Bavario jam septembre; tamen ĝi ne haltis ĉe Inno, sed tramarŝis la tutan Bavarion, kaj je 1805-09-22 prenis pozicion ĉe **Ulmo**, je 200 km okcidenten de Inno.

Nu, Napoleono decidis alie ol la Viena militkonsilio, kaj frapis ne en Italio, sed en Bavario. Lia Granda Armeo avancis rapide, kaŝe kaj dise; je 1805-10-11 la armeo de Mako jam estis encirkligita sen ke Mako, malgraŭ kelkaj bataletoj, konsciis tion.

La 15-an de oktobro venis parlamentario de Napoleono kaj komprenigis al Mako lian situacion. Mako konsentis intertrakti, kaj je la 17^a de oktobro li subskribis kondiĉan kapitulacion — kapitulaci se antaŭ la 26^a lin ne malblokos trupoj rusaj *aŭ aŭstriaĵ*. Tamen al Napoleono urĝis fini la aferon, kaj je la 19^a de oktobro Mako kapitulacis.

Do, li kapitulacis ĉe la pli malproksima Ulmo pli frue ol la rusa armeo devus veni ĉe Innon; ne Kutuzov devis helpi la aŭstran armeon, sed la aŭstra armeo devis sekurigi la venon de la armeo rusa; kaj la aliancanoj ne planis ian batalon ĉe Ulmo. La aŭtoroj mem koncedas, ke (p. 9)

La malfruo de la cara armeo je tiu tempintervalo estas temo de historiista diskuto. Kelkaj kondamnas la interpreton per la kalendara diferenco en la militstrategio kiel «bizaran miton». Sed klarigo, kial tiu tempa koincido estis hazardo, restas defio por aro da akademiaj disertacioj.

Laŭ mi, ĉi tie ne estas ia «civilizacia diferenco», sed la banala kaj tute tutmonda kutimo de militistoj kaj burokratoj kaŝi sian profesion malkompetenton per efekta cirkonstanco eksterordinara. La aŭstria plano de la kampanjo estis tute erara, de la komenco ĝis la fino. Laŭ la plano sekurigi la armeon de Ferdinando/Mako devis ne la rusa armeo, sed la Tirola armeo de ĉefduko Johano, egale elmarŝinta en septembro kaj uzanta la saman kalendaron Gregorian. Mako ne atendis Napoleonon, kaj ne restis ĉe la interkonsentita pozicio. Cetere, ankaŭ Chandler indikas nenian fonton subtene al sia kalendara aserto — kaj plej suspektinde, mankas spuroj de la kalendara mito en la fontoj samtempaj.

La papa buleo

Interesa kontribuo de la recenzata verko estas la (neoficiala) traduko de la buleo *Inter Gravissimas*, per kiu Gregorio la 13^a diskonigis sian reformon. La traduko aperas paralele kun sia latina originalo.

Servistoj kaj sklavo

Por mi la unua reala «civilizacia ŝoko» aperas jam en la unua alineo de la traduko:

Episkopo Gregorio, servisto de la servistoj de Dio, por eterna memorigo.
Inter la plej gravaj taskoj de nia paŝtista ofico...

La latina *servus servorum Dei* en la lingvojn okcidentajn tradicie estas (mis)tradukata per *servisto de la servistoj de Dio*. Tio estas stranga, ĉar la koncernaj bibliaj vortoj:

la latina *servus* ← la greka δούλος [dulos] ← la hebrea עֶבֶד [ebed]

ĉiuj rektasence signifas «sklavo» (kio ne malebligas okazajn uzojn figurajn kaj hiperbolajn). Mi do atendus «sklavo de la sklavo de Dio» (ruse: «раб рабов Божьих»).

La okcidentanojn ne ĝenas ke oni komparas ilin al paŝtata **grego** (i.a. per la ĉi-supra «nia paŝtista ofico»), aŭ kun **polvo** («ĉar vi estas polvo kaj refariĝos polvo» [Gen 3:19]); sed la simile humila vorto **sklavo** estas por ili netolerebla. Tial ĉiuj okcidentaj biblioj multloke anstataŭigas «sklavo»n per «servanto» aŭ «servisto»; ankaŭ la Londona Biblio ofte faras tion, kvankam konfuze kaj malkohere.

Ekz-e la papa formulo evidente aludas la evangeliojn (unu sama vorto δούλος estas ĝuste tradukita ĉe Marko, kaj eŭfemisme ĉe Mateo):

Sed ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via *servanto* (διάκονος); kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu **sklavo** (δούλος) de ĉiuj [Mar 10:43–44]

Ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via *servanto* (διάκονος); kaj kiu volas esti la unua inter vi, tiu estu via **servisto** (δούλος) [Mat 20:26–27]

Ĝi estas demonstra versio de la 75-paĝa postkongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.

Konatiĝu: uzbeka pilafo

La plej ŝatata kaj tradicia plado de la uzbeka popolo estas pilafo (palov), farita el rizo en kombinaĵo kun viando, cepoj kaj karotoj. En la kaldronon oni metas grason plant- aŭ best-devenan, kutime ŝafan grason. Depende de la viando, kuirmetodo, kuirmaniero kaj spicaĵoj, la pilafo havas dekojn da specoj kaj nuancoj.

Rizo estas la ĉefa ingredienco por pilafo. Rizo estas la baza grenkultivaĵo por pli ol duono de la monda loĝantaro. La patrujo de tiu ĉi kultivaĵo estas Azio. Rizo estas akvokonsuma planto, tial ĝia kultivado estas nepre ligita kun ekesto de akvumata terkulturado. Post la ekesto de rizkultivado aperis ankaŭ pladoj el rizo. Pilafo, kiel plado, kies neanstataŭigebla ero estas rizo, ankaŭ estas konata ekde nememor- ebla tempo.

La mondfama kuracisto kaj enciklopediisto Abu Ali ibn Sina (Aviceno), naskiĝinta apud la urbo Buĥara, siatempe skribis, ke la nomo de la plado “palov osh” konsistas el la komencaj literoj de sep nutroproduktoj, kiuj konsistigas ĝin: P – *pijoz* (cepo), A – *ajoz* (karoto), L – *lahm* (viando), O – *olio* (graso), V – *vet* (salo), O – *ob* (akvo), Ŝ – *ŝali* (rizo).

Pilafo estas unu el la atingoj de la popola kuirarto. Hejme ĉi tiu plado estas kutime kuirata de virinoj, sed dum publikaj eventoj – plejparte de viroj. Ĉiu viro konsideras, ke li nepre devas scipovi kuiri pilafon, kaj ĉi tiu arto ofte servis kiel temo de fiero kaj konkurado. Tiaj pilafkuiraj konkursoj estas ĝis nun okazigataj en nialandaj tetrinkejoj (ĉojĥona). En 2016 la uzbeka kaj taĝika pilafoj estis registritaj en la reprezentanta listo de nemateria heredaĵo de Unesko. Precipe elstaras la Samarkanda pilafo.

Samarkanda pilafo (Samarqandcha palov)

Jen estas unu el la klasikaj variantoj de uzbeka pilafo, tipa nur por Samarkando.

Prenu 200 gramojn da rizo, 50 gramojn da viando, 50 gramojn da graso, 200 gramojn da karotoj, 30 gramojn da cepo. Salo, kumino, pipro kaj aliaj spicaĵoj laŭguste. La recepto estas kalkulita je unu porcio, sed kutime oni kuiras por familio aŭ amikaro.

Fritu en ardvarmegigita ŝafgraso aŭ oleo la pecetojn de viando ĝis ruĝ-bruniĝo, metu distranĉitajn cep-ringojn, daŭrigu la fritadon ĝis apero de bruna koloro. Poste metu flavajn aŭ ruĝajn karotojn distranĉitajn je strioj (pajleretoj), kaj tuj verŝkovru ĉion per akvo, aldonu spicaĵojn (kumino, pipro ktp) kaj kuiru ĝis moliĝo de la karotoj. Salu ĉion kaj enŝutu antaŭe lavitan rizon, enverŝu sufiĉan kvanton da akvo (por ke ĝi superu la riztavolon je 1-2 centimetroj kaj, ne miksante la enhavon de la kaldrono, kuiru sur forta fajro. Post kiam la tuta akvo estos forvaporiginta, kovru la kaldronon por 10-15 minutoj.

Servante pilafon ne miksu ĝin, metu montecan tavolon de rizo sur la teleron kaj

supre metu viandon kun karotoj kaj cepo. Aparte oni povas servi salaton, ekzemple, el tomatoj kaj kukumoj.

Yoqimli ishtaha! – Bonan apetiton!

Pilafo kun viando

Omirkbek estis vendanta ŝafon. Aĉetantoj estas tro elektemaj kaj stultaj. Ili turmentis Omirkbek-on per lavango de demandoj. Ili interesiĝis pri ĉio: el kiu greĝo estis prenita ĉi tiu ŝafo, kiel la ŝafo dormas, kiun voston ĝi havis dum sia junaĝo, kial la kornoj estas tiom dikaj... Komence Omirkbek respondis ĝentile kaj detale. Poste liaj respondoj komencis mallongiĝi. Finfine li apenaŭ povis reteni sin por ne skoldi la aĉetantojn.

Kaj ili daŭrigis adresi siajn demandojn.

– Kiom da jaroj ĝi havas? – demandis la aĉetantoj, palpante la ventron de la ŝafo.
– Ĝi jam estas sufiĉe aĝa. Probable, ĝi estas via samaĝulo, – respondis Omirkbek kolere.

– Kiel ĝi manĝas?

– Kun apetito.

– Kaj kion ĝi manĝas?

– Ho, Alaho! Nur pilafon kun viando, – kriis Omirkbek. – Ĝuste pro tio mi vendas ĝin!

Natalija Ĥodunova



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Kokeriko el la Komitato

<...> mi pensas ke en perspektivo tio povus porti al grava membrokresto en landoj de kategorioj 1 aŭ 2... (Michael Boris Mandirola, 3 dec 2018, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/12296>; rimarkis Paweł Fischer-Kotowski)

Elstara estraro, tamen sen ro

Pri ĉi tiu tuta kampo, tamen, ni devas atendi la esprimiĝon de la estaro... (Renato Corsetti, 15 aŭg 2011, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/6811>)

Homaran(e)oj?

Ni havas tre bonajn rezultojn de tiuj paĝoj en aranaj landoj kaj en Irano. (Renato Corsetti, 28 majo, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/12671>; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Plena apro tro grandus

Komencas apreri en la paĝo... la unuaj jam tradukitaj afiŝoj por la Esperanto-tago 2019. (Renato Corsetti, 31 maj 2019, komitato-de-uea@yahoogroups.com, rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

Serĉu la virinon, aŭ: nur kurta dependeco

Eble ni pensu pri alaj formoj de organizo, ekzemple independaj grupoj por mallongaj projektoj. (Ŝtefan, <https://www.liberafolio.org/2019/07/30/arosev-la-esperanto-movado-pereas/#comment-3290>)

Nenio nova sub la zono

Uranistoj kaj hermafroditoj ekzistis jam en la epoko de Zamenhof (Giorgio Silfer, HeKo 710 2-C, 2 jun 19, <http://www.esperantio.net/index.php?id=3835>)

La ĝusta aĝo por kompili vortarojn

...mia kompilaĝo vershajne svarmas pro diversspecaj eraroj... (J. Pisarev: Vortaro de esperantaj sinonimoj, Rostov-Don, 2017, p. 3; trovis Ionel Onet; la nomo de la aŭtoro estas ĝusta)

Al donaco donacita donacon ne esploru

Por asocioj kaj rondoj la eldonejo donacas unu ekzempleron donace. (mesaĝo al la Libroservo de UEA, ricevis Ionel Onet)

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Ĝi estas demonstra versio de la 75-paĝa postkongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>